



# SALUTON!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

16 Aprilo 2005

№ 7

Redaktoro: Araneo

**Adreso (provizora):**  
**Esperanto Societo de Ŝikago**  
**p/a Viktor Pajuk**  
**8228 O'Connor Dr., # 2F**  
**River Grove, IL 60171**  
**(773) 344-2276**  
**FAX: (708) 456-2750**

### Estraro:

Prezidanto – Roberto Stalzer  
 Vicprezidanto – Karlo Offutt  
 Sekretario – Viktoro Pajuk  
 Kasisto – Karlo Gunn

### Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;  
 Familio \$30; Regula \$20;  
 Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.  
 Dues are needed for the routine expenses of our Society.  
 Check should be payable to:  
**The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our  
**Treasurer, Charles Gunn,**  
**828 S. Ada, Chicago IL 60607**

### Kunvenoj:

Membroj de la Ĉikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Avenue, Ĉikago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

**Bonvenon!**

### ADIAŬ, PAPO!

Kun vorto “Amen!” sur la lipoj forlasis tiun ĉi pekan mondon la Homo, kiu, kreante historion, ĉiam estis malfermita por dialogo, heroo de XX jarcento, Johano Paŭlo II. “Gefratoj, je 21a horo kaj 37 minutoj nia kara Papo revenis al nia ĉiela Patro”, – tiel ŝtatestretario de Vatikano kardinalo Anĝelo Sodano informis la mondon pri la morto de Pontifiko. Por ni, esperantistoj, ĉu kristanoj aŭ islamanoj, gravas ke dum lastaj jaroj Papo enkorpigis ideon de E-propagando: siajn kutimajn Kristnaskajn kaj Paskajn mesaĝojn li sendis ankaŭ Esperante. Kaj ni dankas pro tio al li – granda civitano de l’Tero!



### LASTE OKAZIS

La lasta marta kunsido de E-societo konstistis el du partoj. Unue faris krear raporton nia klub-ano *Gregoro DOLGIN*. Vere oni povas nur bedaŭri, ke aŭtoro de tri libroj (aforismoj, poemoj, noveloj, eĉ romano), kiu loĝas en Ŝikagio de 1996, nur unuafoje donis al ni eblecon ĝui lian verkaron. Al legantoj estas proponata unu poemo, kiu aperis el-sub la plumo de Gregoro en la jaro 1992:

\* \* \*

Kiam mateno varme vin karesas,  
 Al piedmont’, al regno de silent’,  
 Al randarbar’, ĉu pina aŭ cipresa, –  
 Alvenu, kien vokas via sent’.  
 En ombro de smeraldarbara tendo  
 Aŭskultu kiel spiras verda ter’.  
 En la kviet’ eterna vin atendos  
 Neelĉerpita fonto de sincer’.  
 Ĝis nokt’ stelplena vi, strangul’, vagante  
 Vin sentos kiel parto de l’Natur’.  
 Nur tera saĝ’ kaj lingvo de amantoj  
 Kapablas nin konsoli en obskur’.  
 Kaj poste, se angoro aŭ laciĝo  
 Vin klinos, kvazaŭ herbon frua neg’, –  
 Vi rememoru tagon plej feliĉan –  
 En verda templo sonis via preĝ’!

Redakcio de “SALUTON!” deziras al nia samideano Gregoro novajn sukcesojn sur la kampo de verda literaturo!

#### UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –  
Home of a comprehensive FAQ list  
[http://www.esperanto.net/info/index\\_en.html](http://www.esperanto.net/info/index_en.html)

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;  
toll free: 1-800-ESPERANTO  
(1-800-377-3726)  
<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association  
<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet  
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course  
<http://www.mintex.demon.co.uk/espviva/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation  
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo  
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format  
<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:  
<http://www.wrn.org/audio/poll1.ram>

### Sekvantaj kunsidoj:

**27an de Aprilo** – pri sia sperto de E-tradukisto en mistera Tanzanio raportos d-ino **Gertruda Novak**

**27an de Majo** – nia fora ano **Marko Ŝafrot** gvidos nin tra la mondo de Mefisto

**22an de Junio** – temo anoncota (prelegonto serĉata)

**NOTU!** ELNA-Kongreso 2005 okazos en Aŭsteno, Teksaso de la 10a ĝis la 13a de Junio. La oficiala kongresa retpaĝaro jenas: <http://kongreso.hewgill.com>

Ankoraŭ unu interesa novaĵo: nia estimate s-ro prezidanto pasigis tri (!) semajnojn en fora Irano. Pri siaj aventuroj, travivaĵoj kaj impresoj rakontas *Roberto STALZER* mem.




#### Faira simbolo de Zoroastrismo

Post kiam irananoj kaptis garantiulojn en la Usona ambasadejo en Tehrano en sepdekaj jaroj kaj ajatolo Ĥomejni fariĝis tutŝtata gvidanto ne estas kutime renkonti usonan turiston sur la stratoj de iranaj urboj. Eĉ nun forestas diplomatiaj rilatoj inter Usono kaj Irano, kvankam tio ne malhelpis min viziti antikvan Persujon.

5000 gesamideanoj membras Iranan E-centron, 2000 el kiuj loĝas en ĉefurbo. La islama respubliko kaj nun bonvenigas E-on kaj en 20aj jaroj de XX jc. Persujo proponis ILon kiel oficiala ene de vLigo de Nacioj. Kaj dank'al loka E-istino ebligis mia vojaĝo al la lando.

Tie mi konatiĝis kun multaj vidindaĵoj: ruinoj de Persepolo, Nacia Juv-elmuzeo, Fajra templo de zoroastranoj, tombo de Kiro la Granda, Isfahana historia placo, Eram-ĝardeno en Ŝirazo, multaj moskeoj. Ankaŭ 8 miliona Tehrano estas vizitinda urbo. La lokan kuirarton mi trovis bongustan kaj varian.

Irano estas miraklo lando, kie kontraŭaj ideoj samtempe veras, kio nep-re devas konfuzi usonanojn. Ekzemple, multaj rigoraj leĝoj estas ofte ignorataj: temas pri kontraŭalkohola leĝo aŭ tiu pri satelita televido. Mi rimarkis, ke multaj irananoj admiras Usonon, eĉ kiam



registaro ne subtenas tion. Virinoj publike ege conservative vestas ilin, sed en privata hejmo multaj uzas parfumojn kaj ŝminkon. 'Taruf' estas formo de ĝentileco, kiam oni proponas neakcepteblan donacon kaj vi devas fari ĉion por rifuzi. Kaj tiuj ekzemploj multas.

Sed la plej granda mia eltrovo estis la homoj mem. Irananoj estas amikaj, ĝentilak kaj bonhumoraj. Mi ne rimarkis artefaritecon. Kun granda plezuro mi montri(a)s al vi fotojn, sed mi deziras ke multaj usonanoj persone spertu gastecon de persoj. Eble iam regnos en Irano registaro, kiu pli koincidas kun nacia karaktero. Eble iam en mia Ŝikago E-o estos same populara, kiel en Tehrano. Kaj mi estos ege bonŝanca, kiam mi denove vizitos Iranon denove.

*Roberto*

#### Anoncetoj

Al la Vilna UK jam aliĝis tri membroj de nia societo, kiu ankoraŭ planas viziti Esperantion'2005? Dum UK estas planataj renkontoj kun la samideanoj de niaj ĝemelurboj por starigi duflankajn rilatojn.

ELNA proponas al ni organizi venontjaran Kongreson en Ŝikago aŭ apude. Kion vi pensas pri tio? Bonvolu informi redaktoron

Denove kun vi estis  araneoesp @ yahoo.co.uk